

LA NOVA PAPA

(Kunmeto de la tekstoj de Damilano, Cappellani kaj Testa; traduko de Antonio De Salvo)

La nova Papo, Albino Luciani, estas 66-jara. Patriarko de Venecio (kiel Sankta Pio X-a kaj Johano XXIII-a), li estis nomita kardinalo la 5-an de marto 1973. Li decidis nomiĝi Johano-Paŭlo I-a, duobla nomo, kiu por la unua fojo aperas en la dumiljara historio de la Eklezio, ĝuste por atesti sian volon daŭrigi la renovigan agadon de la antaŭuloj Johano XXIII-a kaj Paŭlo VI-a.

Albino Luciani devenas el la nordorienta itala regiono Venetio; li naskiĝis en Furno di Canale, vilaĝo en provinco Belluno. Lia patro, socialisto, post multaj jaroj da elmigrado en Svislando, reiris al Italujo kaj trovis laboron kiel vitroblovisto en Murano (Venecio). Lia filo Albino decidis iĝi sacerdoto kaj studis filozofion kaj teologion en la seminarioj de Feltre kaj Belluno. Li kompletigis siajn studojn en Romo ĉe la Gregoria Universitato, kie li doktoriĝis pri teologio. Apenaŭ 22-jara, li estis ordinita sacerdoto kaj tuj iĝis vicparafnestro en sia malgranda naskiĝloko, pli poste en la apuda urbeto Agordo. Samtempe, li instruis religion en la minista teknika instituto de Agordo.

Dum dek jaroj, ĝis 1947, li estis vicrektoro kaj profesoro pri teologio en la seminario de Belluno. En 1949, iĝinte ekde 1948 vikario de la Episkopo de Belluno, li pretigis Eŭkaristian Kongreson kaj verkis katekismon, kiu jam atingis sep eldonojn kaj estas tradukita en multajn lingvojn.

En 1958, Papo Johano XXIII-a, kiu havis la okazon lin apreci kiel Patriarko de Venecio, nomis lin Episkopo de Vittorio Veneto; la episkopa konsekro okazis en Sankta Petro, per la manoj de la Papo mem.

La agado de Mons. Luciani en tiu urbo estis vasta kaj intensa sur la spirita, karitata kaj kultura kampoj. Lia ĉefa zorgo estis la formado de sacerdotoj kaj la evoluigo de la ĉeaj katolikaj organizoj. Sentiva je la suferoj de la malriĉuloj, li neniam mankis al ili spiritan konsolon kaj konkretan helpon.

Kiel Episkopo de Vittorio Veneto, Mons. Luciani partoprenis la Duan Vatikanan Koncilion, kies spiriton li kapablis profunde travivi, kaj kies instruojn li same profunde interpretis. Jam en aprilo 1962, antaŭ la malfermo de la Koncilio, li klarigis, en letero al la klerikaro kaj al la fideluloj, la konciliajn celojn, invitante al la preĝo por la ekumena unuiĝo de ĉiuj Eklezioj.

Je Kristnasko 1969, Mons. Luciani estis nomita de Paŭlo VI-a Patriarko de Venecio; la tuta urbo feste akceptis la novan paŝtiston. La simpleco kaj la korelverŝemo de la nova Patriarko tuj havigis al li la simpatiojn de la Venecianoj. Li multe favoris la formadon de la junularo kaj de la laikoj, kun menso malfermita al la novaĵoj, kun preciza kohereco kun la nerezigneblaj principoj de la Eklezio, kun profunda kono de la sociaj fenomenoj de nia tempo. En iu lia letero, estas dirite, ke plurismo povas ekzisti en tiuj tempoj, kie la aferoj estas pridiskuteblaj, sed ne kiam temas pri dogmoj, ĉar alie la kredo estas aliigita.

Almenaŭ 400 000 homoj, kiuj plenigis la Placon S. Petro kaj la grandan antaŭan straton, aplaudis la novan Papon dimanĉon la 27-an de aŭgusto, kiam Johano Paŭlo I-a aperis ĉe la centra loĝio de la Baziliko por sia unua dimanĉa rendevuo kun la fideluloj. La aplaŭdoj renoviĝis eĉ pli forte kaj varme por substreki la nelongan, tamen tre signifoplenan paroladon de Papo Luciani, kiu kun korelverŝa tono, kun surpriza simpleco, menciis la tute homan, kompreneblan emociom de la momento en kiu la Kardinaloj lim levis al la katedro de Petro. Liaj vortoj tuj starigis intiman kontakton kun la festanta amaso al kiu Johano-Paŭlo I-a volis riveli la momenton de hezito, kiun li havis akceptante la elekton. Li klarigis, ke li alprenis la nomojn de ambaŭ antaŭuloj pro aparta admiro kaj devoteco al ili, "kvankam - li aldonis - mi havas nek la korsaĝecon de Johano XXIII-a nek la klercon kaj kulturon de Paŭlo VI-a". Kun kora rideto, la Papo aldonis: "Sed nun mi estas en ilia loko, pro tio helpu min!" Post ĉi tiu parolado en itala lingvo, li recitis latine la Anĝeluson, donis la apostolan benon kaj, antaŭ ol foriri, respondis per vastaj mangestoj al la aplaŭdoj de la amaso. Ĉie, flirtado de tukoj kaj flagetoj, festaj voĉoj. Jen la spektaklo, kiun Placo S. Petro ĉiam kapablas proponi en la grandaj okazoj.

VENTOROZO

Kiel tiu disdonita pano
unue disigita sur la montoj
kaj kunligita por fariĝi unu,
tiel estu kunligita via eklezio
de ĉiuj terekstremoj en vian regnon,
ĉar al Vi apartenas gloro kaj potenco
per Jesuo Kristo por la jarcentoj.

Memoru Sinjoro vian eklezion
por antaŭgardi ĝin kontraŭ ĉia malbono
kaj igi ĝin perfekta en via amo
kaj kunligu, el ĉiu flanko,
tiun eklezion, kiun Vi sanktigis
en via preparita regno,
ĉar al Vi apartenas potenco
kaj gloro por la jarcentoj. Amen.

Preĝo el Didake; 2-a jarcento.

XX

BIBLIA NOMARO (daŭrigo)

ABRAM' (Granda Patro)

Abram', ho granda patro, ĉu estas en la memor'
Via enura vivo, kiam kun familio
Inter viaj amikoj, tuj antaŭ procesio
Tra gentoj eksterlandaj, vi ĝojis sen ia plor'?

"Iru el via lando, ripetadas la Sinjor',
Al alia region' laŭ montrata misio;
Vi grande popoliĝos kiel kredproporcio
Kaj vi restos senĉese en mia bona favor'".

Vi fine kamelumas kun edzin' en apudo
Kune kun Lot' la nevo kaj via tuta havo.
Nun vi alrajdas pluen, ĉiam pluen al sudo.

Sed atentu pri Saraj' pro ŝia bela ravo
Laŭdata de faraon' kun avida aludo.
Nur rapida ekzilo estas por vi du savo.

4/2/78

ABRAHAMO (Elstara Patro)



"Mi vagas seninfane, tutsola kun la edzin'
Ĉiam ventro fermita! Al kiu la heredo?
Al kiu la kameloj? Al kiu mia kredo?
Ho Vi, eterna Patro, ĉu ricevos konkubin'?"



"Kontemplu la ĉielon, rigardu stelojn sen fin',
Kalkulu la sablerojn, senĉese kun obsedo,
Kaj diru senmensoge, ĉu eblas la posedo
De ĉiuj. Ili estas via idara difin'".




Inter mi kaj vi estas interligo rokfirma
Kaj ĝis la tera fino mi estos via Dio,
Ĉar Saraj' saraiĝas per deklaro konfirma

Pri filo tuj naskota por sidi en gvardio
Sub via gea amo kaj kortenere ŝirma".
Aŭskultu, ho Abraham'; jen veka melodio.




5/2/78

A 1.- La duono de  estas 




A 2.-  dividita per du estas 

A 3.- El  formetu  restas 

A 4.- Prenu unu alumeton. Rompante ĝin laumeze, vi faras du pecetojn kaj diras : "Jen ! Unu foje du estas du". Rompu iun el la du pecetoj dirante : "Dufoje du !". Fine rompu la alian peceton dirante : "Trifoje du !" kaj montru la kvar pecetojn tiel pruvante, ke "trifoje du estas kvar".




A 9




P. 7.- Apudmetu tiujn ĉi kvar pecetojn por konstrui la literon :


Z



P. 8.- Per kvar similaj literoj kaj kvar similaj literoj faru kvadraton



P.9.- Per kvar similaj pecetoj faru kvadraton



FKEA-KONGRESO 1979

Ĝi okazos en LILLE, tuj post la UFE-kongreso, de la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo. Temo: La nuntempa katekizo ĉe la infanoj.

Praktikaj informoj aperos en nia januara numero, sed jam nun, nepre rezervu tiun daton!

IKUE-KONGRESO 1979

En LUKSEMBURGO de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto.

URGA ALVOKO Radio-Vatikano ne ricevas sufiĉe da leteroj el Franclando. Skribu!!!

Petu la programojn: Radiovaticana 00120 Città del Vaticano Tel.(06)698 30 45.

NIAJ ANOJ INSTRUAS ESPERANTON: G-roj Bourdon, Degrelle, Delaire, Despiney, Henry, Sevin, Schneider, Véron, Vincent.

Ĉu ankaŭ VI? Skribu pri tio al la redaktorino.

ELDONA FONDUSO: Antaŭan sumon: 565 F. S-ro Despiney: 50 F. Nova sumo: 615 F.

Ni petas la donacontojn, ke ili sendu sian kontribuadon TUJ, ĉar la libro de P. Korytkowski estas nun presata. Ĝi kostos 10 F kaj oni jam de nun povas ĝin mendi per la ĉi suba slipo.

N.B. La venanta komitatkunveno okazos 4bis, rue de la Cerisaie, PARIS, la 10-an de decembro je la 14.30. Bonvenon al ĉiuj aŭskultontoj.

KOTIZTABELO 1979

IKUE kun "Espero Katolika" 48 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 12 F
infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 6 F
Bonfaranto 60 F
Dumviva membro 240 F

UFE kun "Revue Française" 80 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 110 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" 35 F
Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4 704 43.

MENDILO (sendota al P. BOURDON 7, av. Salomon 59000-LILLE)

Nomo kaj adreso:

Bonvolu sendi al mi ekz. de la libro de P. Korytkowski po 10 F + sendkosto.

Mi devontigas min pagi tuj post ricevo de via fakturo.

Dato kaj subskribo:

Dépôt légal: 4ème trimestre 1978 !!! Polycopié par F. M. C.
Papier de presse n° 34 745 !!! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie
Directeur-gérant: Gaston VERON !!! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE